



N-ro 32/77 - 16 aŭg 1977
Aperas ĉiusemajne

Rejkjaviko - la defia kongreso

Rejkjaviko (pp) - La 62-a Universala Kongreso de Esperanto en la islanda ĉefurbo certe estas kulmino en la historio de la universalaj kongresoj.

En la ĉeesto de la ŝtatsprezidanto, s-ro Kristján Eldjárn, la alta protektanto de la kongreso, kaj de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow kaj de aliaj honoraj gastoj, d-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, malfermis la kongreson la 31-an de julio, je la 10-a horo. Baldur Ragnarsson, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, bonvenigis la pli ol 1000 kongresanojn el kvardeko da landoj kaj menciis, ke la islandaj amaskomunikiloj montras grandan interesigon pri la kongreso.

Nome de la islanda registaro la kongresanojn bonvenigis kulturministro Vilhjálmur Hjálmarsson, kiu parolis en Esperanto. Li esprimis sian simpatian al la strebado de la parolantoj de Esperanto batali por liberaj kaj vivantaj kontaktoj inter homoj kaj nacioj tra la tuta mondo. La urbestro de Rejkjaviko, s-ro Birgir Ísleifur, same esperantlingve eldiris siajn salutojn.

Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj membro de la Internacia Patrona Komitato de UEA, faris enkondukan prelegon pri la kongresa temo. Li diris interalie:

"...eĉ perfekta libereco je komunikado ne estos garantio, ke neniam okazos konflikto. Okazis en la pasinteco, kaj sendube denove okazos tragediaj dividoj inter popoloj, kiuj uzas la saman lingvon. Sed la sperto indikas, ke diferencoj de lingvo pliigas la miskomprenon kaj malfaciligas la kunlaboradon. Kontraste, ni en ĉi tiu kongreso scias la kontribuon, kiun komuna lingvo faras al la facileco de interkomunikado. Ne povus esti pli bona demonstro ol ĉi tiu grandioza internacia kunveno sen aŭskultiloj kaj sen interpretistoj.

Ni anoj de la Esperanto-movado, scias ankaŭ la detruajn rezultojn de la limigo de komunikado. Esperantistoj en multaj landoj estis malhelpataj per cenzuro, per oficiala malinstigo, per tuta malpermeso kaj per la bruligo de iliaj libroj. Multaj suferis malliberigon kaj torturon, eĉ la martiran morton. Kaj tamen Esperanto ne estas minaco. Ĝi estas 'danĝera lingvo' nur por diktatoroj kaj ŝovinistoj kaj la reakciuloj."

Unika evento dum la inaŭguro sendube estis la parolado de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, s-ro M'Bow, pri kies parolado Pilo-Press jam raportis en sia antaŭa numero. Ni nur aldonu, ke li parolis franclingve; al la aŭskultantoj estis disponigita la Esperanta traduko.

Dum la inaŭguro ĉeestis diplomataj reprezentantoj de Britio, Ĉeĥoslovakio, Ĉina Popola Respubliko, Francio, F R Germanio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Norvegio, Pollando, Sovetunio, Svislando, Usono.

Solena malfermo

Dimanĉe posttagmeze okazis la solena malfermo de la kongreso, dum kiu salutis la reprezentantoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj. D-ro Tonkin faris la festparoladon, pri kiu ni revenos en unu el niaj venontaj eldonoj.

La rajto je komunikado

Konkludoj de la diskutrondoj dum la UK en Rejkjaviko

1. La rajto je komunikado estas en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo.
2. Por certigi, ke la ebleco estas je dispono de ĉiuj, individue kaj nacie, nepre necesas plene realigi la rajton je informado, proklamita en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.
3. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implikas la eblecon informi kaj informiĝi.
4. Inter la obstakloj al la apliko de la rajto je komunikado estas la lingvaj baroj, kies rilatoj kun la aliaj aspektoj de la problemo estas studentaj kaj esplordaj.
5. Unu demando, kiu meritas studadon, estas: ĉu neŭtrala internacia helplingvo povas fari kontribuon al la solvo de tiu problemoj, je la nivelo de la individuo, de asocioj kaj ŝtatoj, kaj inter la nacioj.
6. Estas nepre necese konservi la integrecon de la kulturoj. La celo de internacia lingvo ne estas anstataŭi aliajn lingvojn, sed funkcii kiel dua, aŭ aldona, lingvo por ĉiuj. Tiel ĝi helpas konservi lingvan pluralismon.
7. En la moderna mondo la realigo de la rajto je komunikado devas inkluzivi la eblecon aliri bazajn komunikilojn. Ĝi ne estas realigebla sen la kapablo legi kaj skribi en la gepatra lingvo. Por plena realigo persono devas havi la eblecon komuniki kun aliaj homoj, ne nur en sia ŝtato, sed tra la tuta mondo. La plej bona protekto de popoloj en landoj, kies lingvo estas parolata de nur malmulte da homoj, kontraŭ la superrego de pli grandaj lingvoj ŝajnas esti la plena posedo de sia gepatra lingvo kaj samtempe de internacia. Por tio la Internacia Lingvo Esperanto estus unike taŭga.
8. La evoluantaj landoj havas moralan devon helpi al la popoloj de la evoluantaj landoj pri la plibonigo de iliaj komunikiloj por komunikado interne de la koncernaj ŝtatoj kaj reciproke kun la ekstera mondo.
9. Meritas la studadon la utileco de la Internacia Lingvo ĉe la evoluantaj landoj kiel komunikilo, kiu povus konservi la lingvan pluralismon. Tia studado devus ampleksi la facilecon de lernado de arte farita lingvo kaj ĝian neŭtralecon, inter aliaj faktoroj.
10. La popoloj, en siaj interŝtataj rilatoj, nepre devas povi kunlabori, en Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO, kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kun plena egaleco kaj digno, por la solvo de la gravaj problemoj, politikaj, ekonomiaj, kaj sociaj kiuj alfrontas la mondon.
11. UNESKO kaj ankaŭ UN devas esplori novajn procedurojn, inkluzive la eblecon utiligi la Internacian Lingvon por dokumentado kaj interpretado, por ebligi la plenan realigon de la rajto je komunikado oficiala inter la Membroj-Ŝtatoj sen lingva diskriminacio.

(Kompilis Ambasadoro Ralph Harry)

Foto-ekspozicio de UNESKO

Dimanĉon, la 31-an de julio 1977, tuj post la inaŭguro de la Universala Kongreso de Esperanto, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, malfermis en la Norda Domo de Rejkjaviko fotoekspozicion pri la laboroj de sia organizaĵo, kompilita de Islanda UNESKO-Komisiono kaj de Universala Esperanto-Asocio. La bildklarigoj estas donitaj en la islanda lingvo kaj en Esperanto. La malfermon de la ekspozicio ĉeestis Kristján Eldjárn, la ŝtatsprezidento de Islando, kaj aliaj altrangaj reprezentantoj de Islando.

Post la malfermo la Ĝenerala Direktoro de UNESKO renkontiĝis por lunĉo kun la Estraro de Universala Esperanto-Asocio kaj aliaj delegitoj de la kongreso.

Re z o l u c i o

de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko 1977

La partoprenantoj en la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenintaj de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1977-a en Rejkjaviko (Islando)

- konstatante kun kontento la iniciaton de UNESKO esplori la kompleksan problemaron de la "rajto je komunikado";
- esprimante sian esperon pri pluaj progresoj en la realigo de la Fina Akto de Helsinki speciale sur la kampo de samrajta internacia komunikado;
- aŭskultinte kun granda interesiĝo la gravan paroladon de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, dum la inaŭguro de la kongreso pri la menciita temo;
- substrekante la gravecon de la lingva aspekto de la komunikado, speciale en internaciaj rilatoj, aspekto ĝenerale ne sufiĉe atentata;
- avertante pri la fakto, ke en la hodiaŭa mondo centoj da lingvoj kaj ties kulturoj estas minacataj de estingiĝo pro diskriminaciaj komunik-situacioj;
- diskutinte en pluraj aranĝoj dum la la kongreso la diversajn aspektojn de la komunikado, speciale la lingvajn barojn al la plena efiko de la rajto je komunikado;

proponas al la landaj Esperanto-asocioj

- daŭre atenti pri la celoj kaj agadoj de UNESKO, precipe sur la kampo de internaciaj kulturaj interŝanĝoj;
- speciale okupiĝi pri la rajto je komunikado, en kunlaboro kun la landaj UNESKO-komisionoj;
- montri, per konkreta internacia kultura agado respondanta al la celoj de UNESKO kaj al tiuj de UEA, la utilon de la Internacia Lingvo por samrajta internacia komunikado;

komisias al la Estraro de UEA

- per taŭgaj dokumentoj informi pri la rezultoj de la pritraktado de la kongresa temo UNESKO-n, ties ŝtato-membrojn, la Ĝeneralan Sekretarion de UN kaj la ŝtatojn subskribintajn la Finan Akton de Helsinki;
- esprimi al UNESKO la urĝan senton de la esperantistaro pri la neceso pli profunde esplori la lingvan aspekton de la rajto je komunikado kaj la rolojn de internacia lingvo en la evoluigo de nova monda komunik-ordo;
- proponi la helpon de UEA kaj ĝiaj specialaj organoj en tiu esplorado.

Kiu estas Amadou-Mahtar M'Bow?

Faktoj pri la Ĝenerala Direktoro de UNESKO

S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kiu partoprenis kaj parolis en la Solena Inaŭguro de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, estas la unua afrikano elektita al la plej alta pozicio en la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Edukado, Scienco kaj Kulturo. Li estis elektita por sesjara oficperiodo en novembro 1974.

S-ro M'Bow naskiĝis la 20-an de marto 1921 en Dakar, la ĉefurbo de nova Senegal (Okcidenta Afriko). Li studis en Parizo kaj instruis ekde 1951 kiel profesoro pri historio kaj geografio en M'adretanio, poste en Senegal. En 1957 li estis kulturministro de la ĵus sendependiĝinta Senegal, en 1966 li iĝis edukministro, en 1968 ministro pri junularo kaj kulturaj aferoj. En 1970 s-ro M'Bow estis nomita Direktoro de la Eduka Bako de UNESKO. En tiu ofico li pledis kaj aktivis precipe por la realigo de la rajto je edukado kaj por la reformo de la edukstemo en la industriaj kaj evoluantaj landoj.

(Daŭrigo sur p. 4)

Kiu estas Amadou-Mahtar M'Bow? (daŭrigo)

Kiam s-ro M'Bow transprenis sian oficon kiel Ĝenerala Direktoro de UNESKO, li diris: "De nun ni estas civitano de ĉiu lando, servanto al ĉiuj membro-ŝtatoj." Sian elektiĝon li nomis "paŝo antaŭen" en la direkton al malkonstruo de antaŭ-juĝoj, kiuj ludis tragikan rolon en la historio de la mondo. "Mi konsideras mian elektiĝon kiel signon de de rekono kaj respekto al la regionoj kaj popoloj en la Tria Mondo, kiuj tiel longe estis malhelpitaj partopreni en la farado de universalaĵaj decidoj kaj sentebliĝi sian influon".

Kiel montriĝis la ĝisnuna aktivado de la Ĝenerala Direktoro kaj kiel li mem deklaris dum la inaŭguro, li dediĉas tre fortan atenton al la problemaro de internacia komunikado. Des pli atentinda do estas lia vizito al la Universala Kongreso - evento, kiu en la historio de la rilatoj inter UNESKO kaj UEA havas precedenton nur en la fama rezolucio de UNESKO pri Esperanto en 1954.

Noto: La raportoj pri la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko baziĝas je bultenoj de la Kongresa Gazetara Servo!

Salutoj

De la SAT-postkongreso kaj internacia feriosemajno de Maturamikaj Esperantistoj (TANEP) sendas al vi kaj al la legantoj de PILO-PRESS samideanajn salutojn F.W. Poppeck, G. Kunze, Owe Pahlke kaj Ruth, kaj aliaj

Opinioj

...mi petas vin, akcepti min kiel abonanton de Pilo-Press kaj sendi al mi ekzemplerojn. Montriĝas tre malbone, ke mi ne estas informita. Tio estas unu el la malbonaĵoj de mia emerita stato, sed la pli bonaj flankoj superas. Tamen mi neniam enuas. La "anata movado" zorgas pro tio.

Elfriede Kruse

Reagoj

Mi rimarkis en Pilo-Press, ke vi ricevis la Honorinsignon de la Germana Esperanto-Asocio, kaj mi elkore vin gratulas, kaj aldonas al tio la gratulojn de Herbert Koppel, kiun vi bone konas. Eble interesos vin scii, ke Herbert Koppel kaj mi ricevis la Honorinsignon de Aŭstralia Esperanto-Asocio. En Aŭstralio ni rajtas meti la literojn F.A.E.A. (Fratulo de A.E.A.) post nia nomo.

P.S. Ankaŭ Ralph Harry estas Fratulo de A.E.A.

Kenneth G. Linton, Aŭstralio

Esperanto en radio

Varsovio: La Esperanto-Ekspreso peris kongresan atmosferon el Rejkjaviko. Ni aŭdis ekstraktojn el la parolado de UEA-prezidanto d-ro H. Tonkin kaj de la islanda kulturministro, la kongresteman kondukon de Ralph Harry kaj kelkajn salutojn de landaj asocioj. La E-anguleto ĉi-foje raportis pri la SAT-kongreso laŭ Pilo-Press n-ro 30/77.

Vatikano: Post la "religia penso" ni aŭdis informojn pri la IKUE-kongreso en Pollando. Ŝajnas ke ĝi fariĝos impona manifestacio.

Romo: Parolas nun denove Antonio De Salvo. Lia juna kunlaboranto, 15-jara junulo, kiu nur antaŭ kelkaj monatoj lernis Esperanton, vizitas la TEJO-kongreson kaj raportos pri ĝi. La stacio nuntempe estas sufiĉe bone aŭdebla.

ORF-Vieno: Post la semajna komentario ni aŭdis la 2-an parton de raporto pri ŝipekskurso al Vieno kaj Aŭstrio de P. Denke, Pécs. Laŭ la leterkasto alvenis de la Postkongreso de SAT 21 salutkartoj. ORF Regional rakontis pri la "giganta radio" de Vieno.